

Gazeto


Andaluzia

ANDALUZIO PER SI, POR HISPANIO KAJ LA HOMARO

11-a Jarkolekto *

Decembro. 1994

N-ro 40



GAZETO ANDALUZIA

FUNDADA POR D. JOSÉ GARZÓN RUIZ en San Fernando (Cádiz) en 1910.

Órgano oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto. REDACCIÓN: Armengual de la Mota, 33, 4º D, 29007 Málaga. DIRECCIÓN POSTAL: Apartado de Correos 864, 29080 Málaga. DEPÓSITO LEGAL: MA-1.136/86. IMPRIME: COPICENTRO, Alameda Principal, 42, MÁLAGA.

DIRECTOR: Andrés MARTÍN GONZÁLEZ.

REDACTORES: José Francisco MARTÍN DEL POZO (Apartado 5184, 29080 Málaga), José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ.

COLABORADORES: Giordano MOYA, Luis SERRANO PÉREZ

GRÁFICOS: Raquel MARTÍN TOVAR y fondo informático de AEU.

ENHAVO

Efika Esperantismo / 7	3
La delegita reto de UEA	6
La decibelo	8
Kohereco	10
La germanaj andaluzoj	13
Denove Mazi	14
Poezia Angulo	16
10 sciindaj aspektoj pri... Esperanto kaj la militoj	18
Tradukista Reto	20
$e = mc^2$	22
Enigmoj	23
Esperanto Aplikata	24

Denove decembro kaj jen nova *Gazeto Andaluza*. En ĉi tiu numero vi trovos novan sektion (elektronikon / teknikon), kies daŭro dependos de via bonvolo: se vi trovos ĝin interesa (aŭ male), niaj poŝtkestoj atendas viajn (mal)instigojn. Kiel kutime, en viaj manoj vi havas multon legeblan... sed se vi volas pli... ek al la laboro, verku mem (aŭ petu ion difinitan) por nia revuo.

Etika Esperantismo / 7

Ekzistas multaj kaj diversaj lingvoj. Oni povas ĝoji aŭ plendi pri tio, sed estas realaĵo. Tamen, ĉu tiu diverseco de lingvoj estas tute natura kaj senŝanĝa aŭ havas certajn leĝojn de evoluo? La lingvoj apartenas al la kulturo kaj evoluas laŭ influoj, kelkaj el la trairado de la tempo, aliaj en rilato al la izoliĝo aŭ facileco de komunikado de teritorioj kaj la precipaj pro la influo de la centroj de povo.

Kiam la mediteraneaj landoj estis sub la regado de la Romia Imperio, la lingvo de regado estis la latino. Kiam la Romia Imperio disfalis, la latino, kiel ordinara lingvo, disiĝis en diversajn dialektojn, sed kiel kultura lingvo, ĝi restis ŝirmata sub la katolika eklezio. Ekster la eklezio estis nur analfabeteco. Multaj reĝoj sciis legi, sed ne skribi.

En la Renesanco alian fojon la latino brilis en la tiama intelektularo, multaj el tiuj jam laikoj, precipe en la ŝtato-urboj de la norda itala duoninsulo. Alvenis la Reformo kaj la latino perdis sian hegemonion, kiel kultura lingvo. Tiam, kelkaj el la ordinaraĵaj popularaj dialektoj fariĝis skribaj lingvoj.

La lernado de la latino bezonis multajn jarojn kaj la burĝonanta komerco bezonis praktikan lingvon por komercadi kaj ankaŭ facile lernebla kompare kun la latino. La komercistoj ne povis sin dediĉi ekskluzive al multejara lingva lernado. Tamen la dialektoj ne estis unuecaj, ĉiu vilaĝo aŭ urbo havas dialektajn diferencojn, kio malebligis unuecan skribadon. Nur kelkaj dialektoj atingis fariĝi lingvoj kaj la ceteraj restis en dekadenco.

Tiu evoluo ne estas malfacile klarigebla. La origino de la naciaj lingvoj ne estas io alia ol la dialektoj de la centroj de povo, tio estas, la urboj, kie loĝis la registaroj kaj kun tiuj ankaŭ la komercado, la financoj kaj la metioj. En la Eŭropo de la jaroj mil kvincent, ekzistis multaj centroj

e povo kaj kelkaj el ili fariĝis la origino de la grandaj absolutaj monarkioj.

La grandaj monarkioj devis alfronti la disigajn fortojn de la feŭda socio kaj samtempe la konkuradon de la aliaj monarkioj, ĉiuj en ekspansia fazo de evoluo. La fortigo de la absolutaj monarkioj kunportis la asimiladon de la feŭdaj regnoj kaj okaze ties burĝonantaj lingvoj, kiuj restis dialektoj.

Por pliigi la unuecon de la absolutaj monarkioj aperis la centraliza administrado, la unika armeo kaj la sola reglingvo. La monarkioj, kiuj ne atingis forte unuiĝi, kiel la pola, fine estis konkeritaj de la najbaraj ŝtatoj.

La Franca Revolucio aliigis la regionajn patriotismojn en francan naciismon. Napoleono povis konkeri preskaŭ la tutan Eoropon. La rekonkerantaj ŝtatoj por batali kontraŭ Napoleono instigis propran naciismon, kiu daŭris kiel la precipa historia faktoro ĝis la dua mondmilito.

Kiel nuntempe evoluas la lingvoj? Ili daŭras evoluante sub la influo kaj evoluo de la regantaj fortoj. Usono hodiaŭ estas je la kapo de nia civilizacio en la scienco, la tekniko, la industrio, la komerco, la financoj kaj eĉ milite. La angla-usona lingvo fariĝas la lingvo de la plej forta centro de povo, kaj pro tio ĝi disvastiĝas tra la tuta mondo. Sed en Orienta Azio aperas novaj centroj de povo, kiuj pli frue aŭ malfrue alvenos al alfrontiĝo kontraŭ Usono. La hegemonio de la angla ne estas definitiva.

Tiel ĝis nun evoluis la naciaj lingvoj. Ili spegulas la fortecon de siaj ŝtatoj. Nenio nova sub la ĉiela volbo, tiel iris ĝis hodiaŭ la blinda evoluo de la socio laŭ la antaŭenirado de la historio.

La nova fazo de la socia evoluo devas esti impulsata de la homa konscio tiel same individua kiel kolektiva. Tiu konscia gvidado de la historia disvolviĝo devas esti impulsata de mensaj faktoroj kaj povas alporti superan tutmondan civilizacion. La hazarda evoluo sub la determinismo de la materiaj faktoroj ne povas forĝi tutmondan konkordan socion. Ĝi okaze

povas generi tutmondan imperion kun la reciproka reakcio de disigaj sendependismojn. Plue daŭros militoj, terorismo kaj eĉ povus okazi mondruniĝo fare de atom-nuklea milito inter konkurantaj centroj de povo.

Tia evoluo jam ne plu devas daŭri. Estas necese, ke la fakta materiala unuiĝo de nia planedo estu sekvata de morala aŭ spirita unuiĝo de la homaro por ebligi, ke tiu homarunuiĝo, sub tutmonda organizo, same kiel la Eŭropa Komunumo, estu kreata en interkonsento kaj en libereco, ne kiel monda imperio.

Tiu nova fazo de la civilizacio devas alveni per komuna agado de ĉiuj homoj, en ĉiuj lokoj, sub nenia naciismo nek nacia lingvo. Nia planedo Tero jam estas nia komuna patrio kaj nia patriotismo devas esti tutmonda. Tio estas homaranismo, ĉar ni ĉiuj apartenas al la homaro. Tiel Zamenhof, kiel persono, komprenis la homaranismon.

La homarunuiĝo nur povas esti alportata de la esperantista movado. Nia lingvo Esperanto, neŭtrala pri naciismoj, devas kunporti tiun spiriton. Esperanto ne plu devas esti nura helpa lingvo por disvastigi tradukaĵojn de naciaj kulturoj, kiuj ne reciproke helpas nin. Esperanto kiel lingvo devas kunporti la propran spiriton de homarunuiĝon.

Antaŭ ol cent jaroj la esperantismo estis idealo. Nuntempe jam devas roli kiel forĝisto de nova realo, la konstruado de nova universala civilizacio.

Giordano Moya



Se vi ne trovas en *Gazeto Andaluzia* kion vi ŝatus legi bonvolu mem verki artikoleon. Ni volonte aperigos ĝin kondiĉe ke ĝi rilatu Esperanton aŭ Andaluzio. Se eble, sendu ĝin al la redaktoro (Poŝtkesto 5184, 29080 Malago) sur komputila disketo (PC aŭ Macintosh, kompreneble resendota) aŭ klare tajpita.

La delegita reto de UEA

En la dua Kongreso de Esperanto, okazinta en 1906, en la svisa urbo Ĝenevo kaj dank' al la iniciato de la franca Alphonse Carles, oni aprobis la starigon de konsuloj por plenumi reciprokajn servojn inter la esperantistaro. La konsuloj, kune kun la fondiĝo de nombraj kluboj en la plej gravaj urboj, pretendis starigi reton por la praktika utiligado de Esperanto tra la tuta mondo, ni ne forgesu ke tiatempе ankoraŭ ne ekzistis la Universala Esperanto-Asocio. La nombro de la konsuloj, rekte elektitaj de la lokaj asocioj, estis en sia unua jaro 120; 232 en 1907 kaj 303 en 1908.

Tamen ĉi nova posteno ekigis problemon ŝuldita precipe pro sia nomo. *Konsulo* internacie estas diplomacia posteno agnoskita de la Internacia Juro kaj regulita de Internacia Traktato, kaj la celo de ĉi posteno estas protekti la naciojn eksterlande. Ekde la komenco en kelkaj ŝtatoj la nomo *konsulo* ne estis oficiale akceptita, ĉar ĝi povus esti komfuzita kun diplomacia reprezentanto de *eksterlanda ŝtato, ĉu Esperantio?*

En 1908 la svisa Hector Hodler kreis la Universalan Esperanto-Asocion (UEA). La origino de ĉi asocio devenis de diversaj flankoj, tamen unu el la plej gravaj estis la naskiĝo de la internacia lingvo Ido, rezulto de adaptiĝo de la lingvo Esperanto. Kun la naskiĝo de Ido, Hodler komprenis ke la diskuto pri lingvaj problemoj ne devis esti la kerno de la esperantistaro, kiu jam perdis la fidon pri fina triumfo de Esperanto kiel internacia lingvo oficiale adoptita de la ŝtatoj aŭ de tutmondaj organizoj. Esperanto jam ne devis esti lingvo uzebla estonte, kontraŭe ĝi estis utila en tiu momento ĉar ĝi povus esti tre praktika por la nacioj de ĉiuj landoj. Tamen por atingi tion estis necese fondi asocion de personoj, ne grupoj, kiuj uzis Esperanton en siaj rilatoj, ekde la vidpunkto komerca, turisma, instrua, ktp.

Tiamaniere la konsuloj iĝis delegitoj de UEA. Ĉi nova posteno estis honora kaj senpaga; povis esti delegito kiu ajn membro de UEA, kies membro povus uzi libere la servojn, ekz. demandoj pri komerco, industrio, turismo, ktp. La nombro de la delegitoj kreskis ĉiujare kaj ankaŭ la kvalito de la taskoj plenumitaj, kio marŝis paralele al la fortiĝo de UEA. Iufoje la agado estis heroo, ekzemple dum la unua kaj la dua mondmilitoj, kiam pere de la UEA-delegitoj estis eblaj la kontaktoj inter la kaptitaj soldatoj kaj iliaj familianoj, aŭ eĉ vizitante ofte militkaptitejojn kune kun la Ruĝa Kruco.

Hodiaŭ la reto de delegitoj de UEA daŭre ekzistas kaj sukcesas, pli ol 2000 delegitoj en la tuta mondo respondas praktikajn aferojn pri kiu ajn temo. Ili estas troveblaj de Alasko ĝis Madagaskaro aŭ de Islando ĝis Vanuatu en la Pacifika Oceano. Kompreneble ekzistas reguloj por uzi ĉi servojn, ĉi tiel oni ne povas demandi pri moralaj kaj honoraj temoj aŭ peti esti akompanata dum ebla vizito.

UEA-delegito povas esti kiu ajn membro de ĉi asocio ekde la dua jaro post sia membriĝo. Oni povas esti ĉefdelegito en iu lando, delegito en iu urbo, vicdelegito, kiu anstataŭigas la delegiton, fakdelegito (speciala pri iu temo, ekz. medicino, juro, instruado, ktp.) kaj juna delegito, tio estas, delegito ne pli aĝa ol 30 jaroj. En Hispanio estas troveblaj ĉefdelegito, 28 delegitoj, 3 vicdelegitoj, 15 fakdelegitoj kaj 2 junaj delegitoj. En Andaluzio ĉimomente mi estas la sola delegito (juna delegito en Kordovo), tamen antaŭ kelkaj jaroj troviĝis preskaŭ 10 delegitoj.

Verdire la plenumitaj taskoj estas kutime tre agrablaj, neniam estas granda laboro. Pli malpli oni ricevas ĉiujare 5 leterojn, petante ĝenerale librojn, informojn aŭ broŝurojn. Antaŭ unu monato mi ricevis leteron de Israelo kiu petis al mi diskon pri sefarda muziko (la samideano antaŭsendis al mi la monon). Normale en ĉiu peto oni atingas novan amikon. Kontraŭe, kiel ĉiu membro de UEA, oni povas uzi la servojn, ekz. antaŭ kelkaj jaroj mi petis al Delegito en Alaska urbo revuon, li sendis ĝin al mi post kelkaj semajnoj. Do, se vi estas membro de UEA minimume de antaŭ unu jaro, mi invitas al vi aliĝi al la Delegita Reto de UEA, la ĉefdelegito en Hispanio estas:

Juan Azcuénaga Vierna
C/ Gral Dávila, 127 portal 7, 2º izda
39007 Santander'

Kaj mi estas la jun-delegito en Kordovo:

José María Rodríguez Hernández
Apartado 611
14080 Kordovo.

J.M.R.H.

La decibelo

La decibelo estas mezuro akirebla per la komparo de voltoj, amperoj, vatioj en cirkvito elektronika, kvankam povas uziĝi ĝenerale por aliaj aplikoj kiel akustiko, antenoj kaj cetero.

Oni povas difini amplifon kiel la rezulton de divido: la amplitudo kiu eliras dividite per la amplitudo kiu eniras,

$$A = \frac{V_{el}}{V_{en}}$$

(V_{el} = elira volto kaj V_{en} = enira volto)

Tamen, la amplifan nombron esprimiĝas normale per la mezurunuo nomita decibelo (dB), kiu kalkuliĝas per la formulo:

$$\text{Amplifo (dB)} = 20 \log \frac{V_{el}}{V_{en}}$$

Kiel deduktiĝas de la difino mem, ĝi ne estas certe mezuro sed rilato logaritma de mezuroj. Se anstataŭ uzi amplifojn de tensio por la kalkulo, ni uzus amplifojn de potenco, tio devigus nin konsideri la rezistancojn,

kurentojn kaj impedancojn en la cirkvito.


Ambaŭ formuloj, la amplifo de tensio kaj tiu de potenco estas la plej ofte uzataj kaj pro tio faciligas multe la kalkulojn. Ĉar la decibelo estas tre uzata, estas tre konvene konition, por interpreti kiun ajn nombron sen devi apelacii al la ĝenaj kalkuloj per logaritmoj.

Tiu sistemo faciligas kalkuli rapide la amplifon aŭ la malamplifon de aparato komponita el pluraj fazoj, se oni konas la nombron de la fazoj. Simple sufiĉas adicii la decibelojn de ĉiuj fazoj por akiri la tutan sumon.

Kiam la rezulto estas negativa, tio indikas, ke ekzistas malamplifo, pro tio, ke la potenco aŭ tensio de eliro estas pli malgranda ol tiu de eniro.

Ĉar la decibelo estas relativa mezuro, por iuj aplikoj estas necese elekti iun nombron kiel referencon, por realigi la mezuron koncernan kaj akiri rezulton absolutan. Ekzemple, en la sonaj sistemoj oni uzas norman impedancon de 600Ω , uziĝas la dBV kaj la dBm.

En la kalkuloj por instali



TV-antenojn kun amplifiloj kaj malamplifiloj (kiel kabloj), uziĝas ankaŭ tiu sistemo de mezuro, sed la referenco uzita estas $0 \text{ dB}/\mu\text{V} = 1 \mu\text{V}$ (milionovolto) en 60Ω de impedanco. Por ĉiuj relativaj mezuroj menciitaj, povigas fari ian ajn adicon kaj subtrahon de relativa decibelo, por kalkuli la eliran nombron de la sistemo.

Utileco interesa de la decibelo estas kompari reciproke la antenojn. En ĉi tiu okazo la referenco estas la rezonanca dipola anteno. Ekzemple, ni supozu direktan Yagi-anteno de pluraj eroj kiuj amplifas ekzakte 16

dB. Kion signifas tio? Tio signifas ke la volto en la klemoj de la Yagi-anteno estas 6,31-oble pli granda ol la volto en la klemoj de la norma dipolo. Se la volto en la norma dipolo estas $100 \mu\text{V}$ en la Yagi-anteno estas $(100 \mu\text{V} \times 6,31) = 631 \mu\text{V}$.

Rafael Sepúlveda

Ĉu vi jam sendis vian kotizon por 1995?

Kohereco

Estaj konsistanta el partoj ne harmonie ligitaj malfacilege pluvivas. Tio okazas je ĉiuj niveloj: mensa, fizika, socia, morala, politika, ekonomia... Tiel memvideblas tio, ke neniu homo (se almenaŭ mezinteligenta) preterpasas *teorie* tiun veron. Mi kursivigas *teorie*, ĉar oftege oni agadas *praktike* alie.

Ĉar raciaj estaĵoj, ĉiuj partoj de nia rezonaĵo, de nia parolado, ktp., estu logike kaj taŭge interligitaj. Se tio mankas, oni ne agadas kohere. La ruiniĝo kaj la fiasko de sennombraj organizoj okazas ĝuste pro disiĝo de la membroj kaŭze de la malkohero reganta inter ili.

Resuma, eblas aserti ke senkohero devenas de interna opono de la ideoj, opono inter ideoj kaj agadoj kaj/aŭ devio de la volo kaŭze de ekstera pelado, kutimoj aŭ egoismo.

Politiko kaj Esperanto

a) Pri politiko, samkiel pri religio, ĉar temas pri aferoj koncernantaj rekte la propran intimecon de la persono, ĉiuj kuraĝas opinii publike kaj private. Rilate politikon, ne malofte la esperantistoj diras, ke ne konvenas kunligi Esperanton kaj politikon, ĉar nian internacian lingvon neniu rajtas alproprigi ekskluzive. Okazas tamen ke tiaj esperantistoj aplaŭdas la subtenon de ajna politikisto, kvankam ili neniam postulis nek petis ĝin. Tio, ĉar ili mem komprenas, ke la politika apogo estas necesa, utila kaj, kaŝe aŭ malkaŝe, dezirata.

Evidente, en ĉi punkto, mankas kohereco flanke de esperantista sektoro. Ŝajne, oni ne komprenas la diferencon inter *ekskluziveco* kaj *partoprenado*.

b) Politika subteno egalas al subteno flanke de politikaj partioj. La politikaj programoj de la partioj estas kondiĉitaj de la propra idearo de la partio mem, de la deziroj regi la landon, la nacion, ktp, de sia voĉdonantaro kaj de la partianoj mem.

La tradiciaj partioj, escepte de tre maloftaj kazoj, ne emas senti la realan lingvan problemon je internacia nivelo kaj tial ili ne ŝatas Esperanton utila. Tiuj organizoj naskiĝis por pritrakti la aferoj de konkreta ŝtato aŭ nacio, ne por prizorgi internacie internaciajn aferojn. Do, oni povas aserti ke, ĉar naciaj aŭ ŝtataj, *a natura* malakordas kun aŭtentikaj internaciaj organizadoj. Tiuj partioj subtenas la internacian agadon kiel rimedon por

prosperi nacie en siaj propraj landoj. (Oni komprenu ke ĉikaze *nacie* egalas al *egoisme*.) Do, kiel oni diras en la kastilia lingvo, "ni ne postulu de la ulmo pirojn".

Ankoraŭfoje, memvideblas la manko de kohereco.

c) La politikaj internaciaj organizoj bezonas la ĉeeston kaj funkciadon de politikaj transnaciaj partioj. Jen tri ekzemploj:

-Politika fiasko de EU. La partioj reprezentataj en tiu organizo defendas siajn programojn egoisme, t.e. profite de la lando reprezentata de ili mem. La unuiĝo de la partioj agantaj en EU estas nur fizika. Tio okazas, ĉar ili estas kaj agadas kiel naciaj/ŝtataj, ne transnaciaj.

-Politika fiasko de UN. La rajto vetoi flanke de iuj (tre malmultaj) ŝtatoj certigas la defendon de siaj propraj intereso, eĉ kiam ĉi lastaj kontraŭas al tiuj de la ceteraj landoj. Oftege la problemoj ne solviĝas, aŭ *solviĝas* malkontentige pro tia rajto.

-Fiasko de UNESKO. *Gazeto Andaluzia* publikigis ĉi-jare la tri rezoluciojn subskribitajn, siatempe, de la respektivaj Ĝeneralaj Konferencoj de la Unesko per kiuj oni defendas kaj subtenas la agadon de la esperantistaro. Tamen, bedaŭrinde, la ŝtatoj membroj apenaŭ (eble neniom) reagis al tiuj rezolucioj.

Ankoraŭfoje montriĝas la malkohereco: la reprezentantoj de la landoj subskribas la rezoluciojn kiel membroj de la Konferenco nome de siaj registaroj; poste, tiuj registaroj preterpasas tiujn rezoluciojn.

Aldone al tio menciindas, ke Usono kaj Britio ne plukontribuis finance al Unesko kiam la informada politiko de tiu organizo deflankiĝis de sia antaŭa agado tre favora al tiuj landoj sed tre subprema al la ceteraj membroj.

La esperantistaro

La rezultatoj atingitaj de la historia kunagado de esperantistoj kaj politikistoj tre malofte kontentigis nin. Tio okazis pro malakordo inter la principoj (naciaj) defenditaj de la partioj kaj tiuj (internaciaj) subtenitaj de la esperantistaro. Escepto estis la fruktodona kunlaborado de la komunismaj partioj de preskaŭ ĉiuj landoj de Orienta Eŭropo kaj tiu de la ĉina registaro unuflanke kaj de la tiulandaj E-asocioj aliflanke. Tamen, eĉ en tiuj kazoj, la respondaj registaroj kaj la partioj subtenintaj ilin apogis E-on ĉar tiamaniere favoris al siaj propraj intereso.

E-o bezonas la ĉeeston kaj funkciadon de transnaciaj partioj (ne naciaj) kiuj agadu en la ŝtatoj kie ili estas/os por prizorgi la defendon, je


internacia nivelo, de la rajtoj kaj devoj de la persono. La ideologia rekono de E-o baziĝas sur la profunda travivado, flanke de la civitanoj, de la supereco de la transnaciaj kaj universalaj interesoj antaŭ la naciaj kaj privataj.

Sen kohero, maleblas unuiĝo.

Sen unuiĝo, neniu projekto realigeblas.

Koheru ni mem: Se ni preterpasas politikistojn, politikistoj preterpasas nin.

Andreo Martín



Feliĉan Kristmason
kaj Bonan Jaron
1995!



deziras al vi la
redakcio de
Gazeto Andaluzia.

La germanaj andaluzoj

Se oni trafoliumas telefon-liston de kelkaj vilaĝoj en la provincoj Jaeno, Seviljo kaj ĉefe Kordovo, aperas kune kun la hispanaj nomoj aliaj kiel Wic, Naher, Rot, Hans, Ots, Schmidt, Mayer aŭ Hilinger. Temas pri la posteuloj de tiuj pioniroj kiuj en la 18a jarcento fondis tiujn urbojn kiuj ankoraŭ nuntempe nomiĝas *Novaj Vilaĝoj*.

Estis en la jaro 1765 kiam la hispana reĝo Karlo la 3-a subskribis dekreton por la fondiĝo de novaj vilaĝoj en Andaluzio. Tiuepoke ekzistis grandaj zonoj en nia lando kiuj estis preskaŭ senhomaj, ĉefe pro la migrado al Ameriko, la militoj en Eŭropo kaj la malsanoj. Ĉi ĉio provokis la nesemadon de tiuj riĉaj teroj kaj la danĝeron en la vojo inter Madrido kaj Kadizo, plenaj je rabistoj. Por solvi ĉi aferon Karlo la 3-a agis same kiel aliaj eŭropaj reĝoj, kiel Federiko de Prusio aŭ Katerino la Granda de Rusio, li ordonis la fondiĝon de kolonioj en la tiel nomataj desertoj de la Peñuela en Jaeno kaj la Parrilla en Kordovo. Campomanes y Olavide, ministroj de la reĝo, akordis kun la bavara aventuristo Thurriegel en 1767 rekruti anojn de Germanio, Francio kaj Svisio por reloĝigi tiujn zonojn.

La novaj enloĝantoj enŝipiĝis ĝis Almerio aŭ Sanlukar' (Kadizo), ka de tie ĝis la novaj vilaĝoj sur ĉaroj tra mizeraj kaj danĝeraj vojoj. Ĉi tiel naskigis vilaĝoj kiel La Luisiana kaj Cañada Rosal en Seviljo; La Carlota, Fuente Palmera kaj San Sebastián de los Ballesteros en Kordovo; kaj La Carolina en Jaeno. Krom fondi novajn vilaĝojn oni pruvis fiksi la bazojn por nova socia sistemo, ni ne forgesu ke oni vivis sub la reĝimo de la Ilustracio. Tiel oni dekretis por ĉi novaj vilaĝoj specialajn leĝojn, malsimilajn al tiuj de la cetera lando, ĉi tiel oni abolis la socian dividon inter nobeloj kaj plebejoj, oni malpermesis la fondiĝon de monaĥejoj kaj la graveco de la Eklezio ene de la socia vivo estis malgrandigata; samtempe oni konstruis unikajn kaj komunajn lernejojn por ĉiuj enloĝantoj. Ĉiu familio ricevis pecon da tero kiu estis la plej grava viv-rimedo. Tiel la malgranda tera propraĵo opoziciis al la grandegaj ter-pecoj de la nobeloj. Ĉi specialaj leĝoj daŭris ĝis la jaro 1835 kiam ili estis nuligitaj kaj la novaj vilaĝoj estis leĝe tute similaj al la ceteraj de Hispanio.

Rilate la nuntempan enloĝantaron la posteuloj de tiuj pioniroj intermiksiĝis kun la hispanaj enloĝantoj de la ĉirkaŭaj zonoj. Tamen, ankoraŭ daŭras la germanaj nomoj, kelkaj jam tre hispanigitaj. Pri la fizikaj karakteroj de

la enloĝantoj, ili estas sufiĉe difinitaj ankoraŭ, la plejmulto el ili estas altaj, blondaj, bluokulaj kaj kun pala haŭto. Ili estas ankoraŭ nomitaj *germano*j, la *germanaj andaluzoj*.

J.M.R.H.

Bonvenon, Mazi!

Mazi estas lingvokurso kiun BBC en Londono kreis speciale por infanoj kaj junuloj.

Mazi estas aŭdvida instruprogramo, kiu bone taŭgas konatigi junularon kun alia lingvo. Ni esperas ke ĉiuj ĝuos la kontakton kun Mazi.

Lerni lingvon... laŭ natura metodo
Infanoj lernas duan lingvon tiel kiel ili lernis sian nacian lingvon: preterpase kaj sen iri al lernejo. Infanoj estas tre lernemaj, ili tuj klopodas ripeti vortojn kaj frazojn en la fremda lingvo. Tion oni povas konstati inter infanoj de eksterlandaj gepatroj. Tiuj infanoj parolas multe pli rapide la lokan lingvon ol la gepatroj, krome ili parolas ĝin preskaŭ flue kaj sen prononceraroj.

Tio ŝajnas esti stranga, sed infano havas naturan talenton lerni lingvon per nur rigardi kaj aŭskulti, same kiel ili lernas la patrinan lingvon.

Estas pli malfacile lerni fremdan lingvon kiam oni fariĝas pli aĝa.

Tial estas konsilinde komenci lerni fremdan lingvon plej frue. La Mazi-metodo uzas tiun naturan talenton de infanoj; ĝi estas bazita sur la simpla principo de rigardi, aŭskulti kaj lerni.

Jen kelkaj informoj pri la materialo kaj pri la maniero uzi ĝin. Unue rigardu la enhavon. Ĝi konsistas el 180-minuta videokasedo kaj laborlibro en Esperanto. La Mazi-rakonto estas dividita en 12 partoj. Oni planas ankaŭ eldonon de tekstlibro kun la kompleta teksto de la video-scenaro.

Sur la vidbendo estas amuza desegna filmo, kombinita kun aldonaj scenoj por ke la lernanto bone lernu la nekonatan lingvon.

Temas pri la Reĝo kaj Reĝino de Gondolando kaj ilia filino Princino Silvia. Silvia kaj Karlo (la ĝardenisto) enamiĝas. Sed ankaŭ la Ministro de la Reĝo, Korvaks, estas enamiĝinta en la Princino. Korvaks ĵetas Karlon en la prizanon; tie Karlo konatiĝas kun Mazi, agrabla ekstertera monstro.

Mazi havas strangan econ: li manĝas horloĝojn!

La vidbendo estas registrita komplete en Esperanto. La interparoloj estas tre simplaj kaj facile kompreneblaj, ĉar ili sekvas precize tion, kion la personoj faras en la filmo. La lernanto, aŭskultante kaj rigardante, lernas kvazaŭ ludante fremdan lingvon. De tempo al tempo, sur la ekrano aperas Petro (figuro sur biciklo). Petro klarigas la signifon de gravaj eroj de la nekonata lingvo kaj montras kiamaniere uzi ilin. Ofte muziko aŭ kanto akompanas lin. Cetere, muziko kaj kantoj ludas gravan rolon en la tuta rakonto.

Kiamaniere uzi Mazi?

Fakte ne ekzistas bona aŭ malbona maniero. Ĉefa afero estas, ke la lernantoj estu alfrontitaj kun la fremda lingvo, ĉu per la vidbendo, ĉu per la libro. Plej grave estas, ke vi trovu manieron kiu plaĉas al la lernantoj kaj kongruas kun la situacio en via hejmo aŭ grupo.

La metodo prezentita ĉi poste estu nur ia gvidlinio.

La Mazi-materialo estas tiel projektita, ke lernanto povas uzi ĝin memstare, sed ĝi funkcias pli efektive kaj agrable, kiam du aŭ pli de lernantoj kune uzas ĝin. Eĉ tre juna infano tiam povus iom partopreni kaj *kapti* kelkajn vortojn aŭ esprimojn. Kompreneble, ju pli vi kuraĝigas kaj helpas, des pli

bone estas por la lernanto. Kaj... se vi mem nur scias malmulte pri la nekonata lingvo, simple partoprenu kun la lernanto kaj konstata mem kiom vi ankoraŭ eklernas.

Se vi planas helpi la lernanton - kiu povas starigi multajn demandojn - estas grave ke vi rigardu kaj aŭskultu la tutan filmon antaŭ ol la lernanto ekkomencos. La videotekstlibro helpas vin ekspliki kaj respondi al demandoj.



Poezia angulo**Lastaj Deziroj**

Al tiuj kiuj volas aŭskulti min en la sublimaj
senpasiaj sferoj,

kiel lastan deziron

mi nur petas
daŭre aŭskulti tie, el la silento
minerala de la mortintoj,
ĉi salan murmuron de la vento
inter la kanoj,
la resonon de la maro en la rokĝeto
apud hejme, dum la orientdevenaj tagoj,
la muzikon de la suno,
verŝajne ankaŭ la donacon
de ŝaŭmaj gutoj interlipe
ne forgesante komplete
la guston de la somero kaj la ĝojecon
kiu apartenis nin dummomente,
kaj fine,
kiel luma vazo por la vojo,
la memoron de la ĉielo
kie vibras
la somera sonorilo kiam faliĝas la vespero.



Ene regos la silento,
la obskura silento de la profunda nokto.

Kaj ora cikado kantos sur mia brusto.

Nenio.

Nek la fatalaj sorĉoj de la ombro
nek la akvo de la forgeso
povos ion

kontraŭ tiu lumo.

Kaj la eterna memoro de ĉi bela mateno,
sia koloro kaj sia gloro
kaj la ora memoro
de ĉi simpla bukedo de simplaj
majaj lekantoj
kiuj en la apertita fenestro
ekflamiĝas kontraŭ la mar'

kaj sia fragila parfumo
malgraŭ la vintro kaj la varmeko de la jarcentoj
superregos
la silentajn florojn de la Orko¹

senarome.

Carlos Clementson,
de la libro *Memoro de la Lumo*

Carlos Clementson (1944) estas unu el la plej
akvalitaj nuntempaj poetoj de Kordovo en kies
Universitato li estas profesoro pri Hispana Literaturo.

¹ ĉe la romia popolo estis la dio de la inferoj

10 Sciindaj aspektoj pri...

...Esperanto kaj la militoj

1. La unua mondmilito malbone influis en la disvastigo de Esperanto. Ĉi tiu milito komencis nur kelkaj tagoj antaŭ la 10a Universala Kongreso de Esperanto en Parizo (Francio). Preskaŭ 4000 geesperantistoj aliĝis al ĉi internacia renkontiĝo, sed multaj karavanoj de samideanoj devis reveni sialanden kiam eksplodis la eŭropa milito. Inter ili L.L. Zamenhof mem kaj grupeto de andaluzaj samideanoj kiuj jam estis en Parizo kiam komencis la milito kaj pri kies aventuro oni parolos en baldaŭa numero.
2. Okaze de la unua mondmilito kaj ankaŭ de la dua, la Universala Esperanto-Asocio (UEA) funkciigis servon por kontaktigi la kaptitajn soldatojn kun siaj familioj. Pli ol tricent leteroj alvenis ĉiutage al la sidejo de UEA en Svisio kiuj estis resendataj rapide. Entute la plenumitaj servoj estis pli ol 200000. Ankaŭ multaj esperanto-delegitoj vizitis konstante, kiam tio estis eble, la militkaptitejojn.
3. Sed bedaŭrinde Esperanto ankaŭ estis armilo, ĉar kun la nomo de nia lingvo brita aviadisto baptis sian milit-aviadilon dum la unua mondmilito.
4. La esperantistoj multfoje ne estis tre bone konsiderataj okaze de militoj, ĉar ĉu ili estas spionoj? Ili kontaktas regule kun eksterlandanoj pere de *sekreta lingvo*. Ĉi tion devis pensi la japana kontraŭspiona servo kial konsideris ke esperantisto estas kiel *akvomelono*: verda ekstere sed ruĝa interne.
5. La solidareco inter esperantistoj detruas barilojn kaj tranĉeojn. Konataj estas kelkaj okazintaĵoj kie ĉefrolulis du aŭ pli *malamikaj* soldatoj kiuj eltrovis en milit-kaptitejoj ke ili estis samideanoj. Sed la plej nekredebla aventuro estis tiu germana soldato kiu dum la dua mondmilito ebligis la fuĝon de *malamika* soldato kaŝigante lin poste proprahejme. Kompreneble ambaŭ estis esperantistoj.
6. Multaj esperantistoj rifuzis partopreni en militoj aŭ militservi dum pacaĵ jaroj. Jam en la 20a jardeko pli ol 100 esperantistaj militrifuzantoj estis malliberigitaj en diversaj landoj.
7. Dum la hispana civila milito kelkaj esperantistoj de diversaj landoj, ĉefe germanoj aŭ jugoslavo, aniĝis en la Internaciaj Brigadoj, sed neniam estis tre bone akceptataj pro sia konstanta deziro propagandi tiun *strangan* lingvon.

8. En 1944 la judoj, ĝis tiam devige enloĝigitaj en la varsovia geto, leviĝis armile kontraŭ la naziaj okupantoj, ĝi estis krŭela lukto kiu finiĝis per la pereco de preskaŭ ĉiuj judoj de la pola ĉefurbo. La luktado de la polaj judoj komencis en la Strato Zamenhof de la varsovia geto.

9. En 1967 la lando elektita por okazigi la Universalan Kongreson de Esperanto estis Israelo, bedaŭrinde subite okazis la *milito de la ses tagoj* kaj ĉi tiel la kongreso estis reorganizata rapide en Roterdamo (Nederlando).

10. Bedaŭrinde hodiaŭ la militoj ankoraŭ ekzistas. Jugoslavio estas la plej aktuala kaj apuda lukto inter homoj. En la jaro 1992 anonco aperis en diversaj gazetoj, la esperantista asocio de Zagrebo en Kroatio deziris kontakti kun eblaj esperantistoj inter la 14000 UN-soldatoj, blukaskuloj, venintaj sur la teritorion de la iama Jugoslavio.

J.M.R.H.

Aŭkcio de Vivoj



12-paĝa broŝuro kiu entenas tradukon de verko de Lukiano de Samosato.

Satira kritiko kontraŭ la filozofoj grekaj, senkompate ridindigitaj.

Vi povas aĉeti ĝin sendante 200 pesetojn (poŝtmarkoj) al

J.F. Martín
Poŝtkesto 5184
29080 Malago

Tradukista Reto

Kutimaj legantoj de *Gazeto Andaluzia* (kiuj, bedaŭrinde, ne egalas al kutimaj ricevantoj de la revuo) scias pri la klopodoj de AEU kiu disvastigas senĉese kaj senlace ĉion rilatan al aplikado de esperanto en komerco, industrio -ĝenerale en la ekonomia kampo- kaj en profesiaj agadoj. Ŝajnas, tamen, ke ankoraŭ estas samideanoj kiuj ne fidus je tiu maniero uzi nian internacian lingvon, jen ĉar opinias ke ĝi devas esti uzata nur por vivigi la Internan Ideon, jen pro tio ke defetisme kredas ke ĝi neniam estos aplikata en eksterkulturaj kampoj ke ĝi ne utilas por gajni monon. Naive ili pensas pravi, kaj senvole, tamen efikege, ili kunlaboras kun kiuj malfamigas nian karan lingvon.

Por pravi la malon kaj, samtempe, kuraĝigi ĉiujn aplikadi la lingvon, jen la interna regularo de Internacia TradukReto pere de Esperanto (ITRE), al kiu apartenas 109 tradukistoj per 29 lingvoj en 30 landoj, nuntempe regata de s-ro Manuel Durand (Les Nids, F-49190 Saint Aubin de Luigne, Francio, fakso +41-18-32-77, telefono +41-78-47-45).

Internacia TradukReto pere de Esperanto (ITRE)

1. Partoprenantoj

Povas partopreni en la Internacia TradukReto la Esperantistoj kiuj konsentas pri tiu ĉi regularo kaj kiuj ricevis konsenton de la Internacia Gvidantaro.

2. Fundamenta Principo

2.1 Ĉiu tradukisto uzu nur sian denaskan lingvon kaj Esperanton. La unua tradukisto tradukas de sia denaska lingvo al Esperanto. La dua tradukisto tradukas de Esperanto al sia denaska lingvo.

2.2 La retanoj rajtas labori kun

amikoj, samklubanoj, k.a., sed ĉiam sub respondeco de la registrita membro.

2.3 Se iu retano troviĝas senhelpa antaŭ tro faka teksto, li petu de sia kliento pliajn informojn: fotojn, desegnojn, eĉ anglan aŭ germanan nomon de iu elemento. Li transdonu al la duaj. Se la malfacilo estas tro granda, li sin turnu al fakulo eĉ ne membro de la reto.

3. Mendantoj

La Internacia TradukReto laboras en ĉiuj fakaj sferoj: komerca aŭ kultura, ŝtata aŭ

neŝtata, profitcela aŭ homcela. Ĉiu retano devas mem trovi klientojn en sia lando inter siaj samlingvanoj per afiŝoj, anoncoj, prospektoj, vizitoj, kontaktoj aŭ alimaniere... Por tiu relative grava speciala laboro, la iniciatinto povas ricevi helpon de samideanoj (eĉ komencantoj).

4. Tarifo

4.1 Pri la komercaj, kulturaj aŭ profitcelaj laboroj:

La traduklaboro estos pagata de la mendanto: sur la bazo de 1,50 x minimuma leĝa hora salajro por 100 Esperantaj vortoj. 60% de tiu prezo estas por la unua tradukisto (de la denaska lingvo al Esperanto). 40 % ricevu la dua tradukisto.

4.2 Specialaj kondiĉoj pri la homcela laboroj:

La unua tradukisto traktadas la kontrakton kun la mendanto. Li rajtas proponi eĉ senpagan servon por letero aŭ ĉia mallonga teksto. La dua tradukisto devas konsenti pri la servo sub la kondiĉoj difinitaj de la unua tradukisto.

Okaze de tradukota teksto kun pli ol 500 vortoj sub specialaj kondiĉo, necesas antaŭkonsento

de la dua tradukisto.

5. Personaj kaj materialaj kondiĉoj

Por plenumi tiun laboron, necesas:

- a. tre bone mastri Esperanton kaj sian denaskan lingvon;
- b. disponi pri tajpmaŝino;
- c. prezenti la laborojn sen tajperaro;
- d. kiel eble disponi pri faksaparato;
- e. sin devontigi obei la regulojn definitajn de la Internacia Tradukreto por pruvi la faritecojn de la traduko, kaj por transpigi la konvenajn sumojn. Bonvena estas komputilo aŭ alispeca moderna komunikaparato.

6. Laborrapido


Ĉiu tradukisto laboru kiel eble plej rapide kun la minimuma taga bazo de 1000 vortoj.

Se leganto bezonos mendfoliojn aŭ pliajn informojn, kontaktu min ĉe la adreso de la revuo.

A. Martín

Gazeto
40
Andaluza

$$E = mc^2$$



La televido montris al ni, antaŭ kelkaj monatoj, la buntajn bildojn pri la kometo kiu koliziis kontraŭ la planedo Jupitero, memorigante samtempe al ni ĉiuj ke ĉi tia danĝero ekzistas ankaŭ se oni parolas pri la Tero, kvankam ĉi afero montriĝas kiel verŝajne malebla.

Tamen, la kataluna sciencisto Joan Oró, funkciulo ĉe la usona NASA, diris antaŭ kelkaj semajnoj, okaze de disertacio, ke la kometoj estis

gravaj roluloj en la origino de la vivo sur nia planedo. Asertis Joan Oró, ke antaŭ 4600 milionoj de jaroj grandega kometo, pli malpli tiel granda kiel la planedo Marso, koliziis kontraŭ la Tero; la kolizio mem, kune kun miliardo da aliaj kometoj pli malgrandaj, provokis la kemian reakcion kiu originis la akvon, kaj ĉi tiel la vivon sur la planedo Tero.



Antaŭ 65 milionoj da jaroj, laŭ la profesoro Oró, alia kometo defaliĝis sur la Teron, ĉi foje temis pri *eta* kometo kies kolizio provokis la kratero Chic Xulub en Meksikio, la plej granda en la mondo: proksimume ĝi mezuras 300 kmojn. Ĉi kometo kaŭzis la malaperon de la vegetaĵoj kaj supozeble ankaŭ de multaj bestoj, inter ili probable la dinosaŭroj. Ĉi ĉio igis ke la mamuloj, ĝis tiam loĝinte kaŝitaj ene de kavernoj, disvastiĝis tra la tuta planedo.

Sed ĉu eblas tria grandega kolizio de kometo? La profesoro Oró ne rifuzis ĉi ideon, pro la fakto ke frue aŭ malfrue alia kometo povus kolizii kontraŭ la Tero, tamen la spaca homa teknologio povus deflankigi sukcese tiun supozitan kometon. Krome, ĉu ĉi tio ne estas la intrigo de kelkaj scienfikciaj filmoj?

Chema Rodríguez

Enigmoj

Ĉifoje ne temas pri vortenigmo: ni proponas al vi, leganto, trovi la 8 diferencojn kiuj ekzistas inter la du imagoj apudaj. Se vi trovos ilin, bonvolu memori ke vi povas gajni libropremion! Sendu fotokopion de la solvo al la redaktoro (la adreson vi trovos en la interna parto de la kovrilo!)



Gajnis libropremion nia samideano A. Escamilla Roa, el Linares, kiu sendis al ni la ĝustajn solvojn de la Krucvortoj (GA 39). La solvon vi trovos ĉi sube:



Esperanto Aplikata

Interŝanĝas uzitajn poŝtmarkojn el ĉiuj landoj. Adreso: J. Manuel Alonso de Arco, Alameda de Capuchinos, 8-5^ºB, E-29014, Malago, Hispanio.

Pola farbisto, ĉambotapetisto serĉas laboron en okcidenta Eŭropo. Scioj ankaŭ pri agrokulturo. Parolas nur en esperanto. Jan Skriba, poczt. skr. 19, PL-44217, Rybnik, Polio.

Startu vian propran komercon en via propra hejmo, vendante altkvalitajn juvelojn de firmao CABOUCHON, TDK-Eksport, Strandvej 22, DK-4711 Kalvehave, Danio, telefono: +45-55-311010; fakso: +45-55-311011.

Germana E-Asocio decidis prepari la eldonon de Internacia Katalogo pri Esperanto-turismo. La enketilon petu rekte ĉe Germana E-Asocio aŭ ĉe Kai Pöhlmann, Schiffbekerweg 32, D-22111 Hamburgo. Fakso: +49-40-7324340.

Esperantkoop, nova Esperanto-kooperativo volonte havus kontaktojn kun similaj organizoj

en la tuta mondo. S-ro Santiago Álvarez Gutiérrez, Apartado Postal 54-800, Santafé de Bogotá-2, Colombia.

Nguyen Do Khanh, el Vietnamio volonte helpos vin perante aĉeton, luon, vendon de domoj, terenoj kaj aliaj proponoj. Por certa respondo enmetu bonvole 2 IRK. Nguyen Do Khanh, Phuoc Long Huyé Thu Duc, TP Ho-chi-minh, Vietnamio.

Mendu la konatan verkon en esperanto *Händel: Mesio*. Fragmentoj kun aldonita teksto. 60-minuta sonkasedo. Prezo: 18 nederlandaj guldenoj al la UEA-konto ELLS-S. Mendoj: Lingvo-Studio, Pk. 87, Budapeŝto, H-1675 Hungario.

Kunlaboru por produkti fridujajn aparatojn. Ankaŭ investado kaj modernaj ekipaĵoj. Turnu vin letere al Shenzhen Kaiguan, Peijian Chang, 315614 Ninghai, Zhejiang, Ĉinio.

Mi posedas kampon kun pli ol 5-hektaroj da tero, apud Bunda en Nord-Tanzanio, 2 km. for de granda ŝoseo (Morn-bazo-Zairio). En ĝi oni povas

ĝardenumi kaj fiŝkaptadi en lageto. Mi invitas turistojn kampadi senpage. Mi planas starigi turistan kampadejon en ĝi, mi serĉas kunlaborantojn investade. Skribu al Julius de Magesse, Migori Christian Centre, P.O.Box 636, Sina-Migori, Kenio.

Grandega usona kompanio *Amway* kiu disvendas pli ol 5000 varojn kaj servojn nur tra privataj personoj serĉas distribuantojn. *Amway* funkcias laŭleĝe en multaj landoj. R. Kent Jones, 5048 N. Marina #D-6, IL-60640 Chicago, Usono.

Fariĝu membro de Internacia Tradukreto pere de Esperanto. Ĉi tradukreto laboras en ĉiuj fakaj aferoj: komerca aŭ kultura, ŝtata aŭ neŝtata, profitcela aŭ homcela. 102 membroj el 30 landoj (29 lingvoj). Inter ili, profesiaj tradukistoj. Daniel DURAND, Les Nids, 49140 Saint Aubin de Luigne, Francio. Tel: +41784745; fakso: +41783277

TAKE (Tutmonda Asocio de E-istoj Konstruistoj), kies prezidanto estas IKE-ano s-ro

Basso, planas aldoni E-tradukon al prikonstrua terminaro de la Eŭropa Unio. Kunlaborantojn bonvenigas s-ro Fabien Van Mook, Echternachstraat 24, NL-5224 TB'S Hertogenbosch, Nederlando.

La Internacia Esperanto-Muzeo petas pri la alsendo de malnovaj n-roj de *Gazeto Andaluzia* por kompletigi sian kolekton, kaj ebligi al siaj legantoj la plej bonajn laborkondiĉojn. Internacia Esperanto-Muzeo, Hofburg, Michaelerkuppel, A-1010 Vieno, Aŭstrio.

Studento de historio kaj politologio serĉas por universitataj laboroj privatajn leterojn aŭ aliajn korespondaĵojn precipe el la Unua Mondmilito, la Hispana Intercivitana Milito kaj la Dua Mondmilito. Cimpa Christian, Budinskyg 10/16/7, A-1190 Vieno, Aŭstrio.

Esperanta klubo ĉe la komitato de junularaj organizoj de Armenio, KYO, celas disvolviĝi armenan kulturon en diversaj landoj per esperanto. Ni pretas inviti en Armenio du aŭ tri reprezentantojn de via organizaĵo. KYO Armenio,

Esperanta klubo, st. Moskovjan
31, 375002 Erevano,
Respubliko Armenio.

UNITECH Aktiengesellschaft.
Nia Teknologia Teamo volonte
konsilas vin: priteknologia
konsilado. Disvolvo de
produktoj kaj farado de
prototipoj. Fabrikado de iloj kaj
aparatoj. Injekte muldi
malpezajn metalojn. Injekte
muldi plastojn. Mekanika
prilaborado. Komponentaroj...
UNITECH Aktiengesellschaft,
Steiermärker Str. 49, A-4560
Kirchdorf/Krems, Aŭstrio.

Eksporto de modaj arĝentaj
juveloj kaj metalaj statuoj (faritaj
en propra laborejo). S-ro
SHAKYA Kabindra Raj, Espero
Craft Enterprises, P.O. Box 282,
Kathmandu, Nepalo; fakso:
977-1-226820, telekso 2322
blustr np.

Antikvaĵoj, malnovaj libroj. S-ro
Mieczyslaw MACKIEVICZ,
MATS, ul. Podmurna 13, PL-87
100 Torun, Pollando.

Persikoj el Malatya-regiono. PK
161, TR-44201 Malataya,
Turkio. fakso: 422-3235876.


Firmao IMS (Internationaler

Möbeltransport Service,
internacia transloĝiga servo) en
Bad Homburg havas partnerojn
en okcidenta Eŭropo (ekz.
Ziegler en Belgio, Amertrans en
Londono, Desbordes en
Parizo...), sed ĝi ankaŭ ofertas
unikan servon por preskaŭ ĉiuj
orienteŭropaj landoj. Se vi
deziras detalojn, bv. faksi al
IMS en Germanio je numero
6172-459111.

S-ro Bahri PERAJ, No. 72,
Shëngjin-Lezhë, Albanio, pretas
peri por turismaj investoj en sia
regiono (interese situata ĉe
Adriatika Maro). Serĉas ankaŭ
monhelpon por albana eldono
de la libro *Ŝanco por Feliĉo*
(traduko estas preta).

Orienta Informaro ofertas
multajn servojn kaj komercajn
proponojn. Petu detalojn de s-ro
Vang Bing, 019 Xintong
Qianshan, CN-246300 Anhui,
Ĉinio. tel: 05668-922549, ĉine,
angle, esperante.

Ĉi tie oni povus legi VIAN
senpagan anoncon. Sendu
ĝin al la redaktoro.



Oroturo
Seviljo

D O K U M E N T O J D E L I G O D E N A C I O J

Projekto de Rezolucio, prezentita de dek unu delegitoj al la Asembleo la 9-an de decembro 1920

La Ligo de Nacioj, konscia pri la malfacilaĵoj, kiuj obstaklas rektan komunikadon inter la popoloj, kaj pri la urĝa bezono trovi ian praktikan rimedon por forigi tiun ĉi obstaklon kaj helpi al bona interkompreniĝo inter la nacioj, sekvas kun intereso la eksperimentojn rilate oficialan instruadon de la Internacia Lingvo Esperanto en la publikaj lernejoj de kelkaj el la membroj de la Ligo; esperas, ke tiu instruado fariĝos pli ĝenerala en la tuta mondo, tiel ke la infanoj de ĉiuj landoj povus scii almenaŭ du lingvojn: sian gepatran kaj facilan rimedon por internacia komunikado; (kaj) petas la Generalan Sekretarion prepari por la sekva Asembleo raporton pri la rezultoj atingitaj en tiu ĉi rilato.

La Dua Komitato, ekzameninte la proponon, konstatis en sia Raporto al la Asembleo, entenata en la Dokumento 253: 20/48/253, la jenon:

La Komitato konsentas kun la subskribintoj rilate la seriozecon de la lingvaj malfacilaĵoj, kiuj obstaklas rektajn rilatojn inter la popoloj, kiel ankaŭ rilate la deziron, ke internacia lingvo devus esti instruata en ĉiuj lernejoj; simpla kaj facila lingvo kiun la infanoj lernus paralele kun sia gepatra lingvo, kaj kiu devus servi la estontajn generaciojn kiel ĝenerala rimedo de internacia komunikado. La Komitato tamen opiniis, ke estus dezirinde komenci per enketo surbaze de de la ekzistantaj faktoj... Fine, la Komitato estis informita, ke tiu ĉi internacia helpa lingvo estis utiligata kun sukceso en pluraj konsiderinde universalaj kongresoj, en kiuj la parolantoj apartenantaj al ĉiuj landoj povis facile kompreni unu la alian, kaj en kiuj la debatoj okazis en unusola lingvo, tiel ke la parolantoj ĝuis la plej kompletan egalecon.

(Laŭ la menciita dokumento, la fina propono de la Komitato al la Asembleo tekstis:)

La Ligo de Nacioj konscia pri la lingvaj malfacilaĵoj kiuj obstaklas rektan komunikadon inter la popoloj, kaj pri la urĝa bezono trovi praktikan rimedon por forigi tiun ĉi obstaklon kaj helpi al bona interkompreniĝo inter la nacioj, sekvas kun intereso la eksperimentojn rilate oficialan instruadon de la Internacia Lingvo Esperanto en la publikaj lernejoj de kelkaj el la membroj de la Ligo; (kaj) rekomendas al la Ĝenerala sekretario prepari por la sekva Asembleo raporton pri la rezultoj atingitaj en tiu ĉi rilato.